eble ankaŭ de l'registaro) kaj ĝiaj sugestoj kaj, kie la leĝo permesas tion, liberigi la infanojn de tiu edukado.

Individue ni pensu kaj agu, ne ĉiam nur sekvante la publikan opinion, mem ne esplorante la gravajn vivdemandojn. Ni estu memkonsciaj kaj ne falu en la tenton, lasi nin influi per kaj de sugestoj. Ne hipnotismaj imagoj, enusgestitaj opinioj kaj laŭtradiciaj kutimoj regu niajn intencojn, nian pensadon, nian agadon, sed nur faktoj pruvitaj per la propra sperto aŭ pripenso kaj per la scienco. Neniun aŭtoritaton ni adoru : nek rangan, nek tradician. Kontraŭ la tradicio ni devas batali ankoraŭ eĉ en la medio de l'liberpensuloj; ĉar ne ĉiuj, kiuj liberiĝis el la eklezia influo, jam povis liberiĝi el la kutimoj, antaŭjuĝoj kaj eĉ dogmoj de la tradicio, ĉu en la privata, ĉu en la publika vivo. Bedaŭrinde la tradiciaj valoroj plaĉas ankoraŭ tre multe al la oportunemo de l'homoj. Pro tio ni instigu la personojn, ne tiom time konservi la morojn de l'prapatroj; ĝenerale nenio el la «bona antaŭa tempo» estas imitinda.

Jen niaj celoj. Tiajn vastajn kaj tamen tiom urĝe realigindajn celojn ni povas atingi nur per internacia organizacio kaj per individua praktika agitado de ĉiu ano.

E. HUFFMEIER kaj O. BUNEMANN.

## LA SOCIETO

**El la loka Grupo en Beaune (Francujo).** — La Beaunera Grupo de «Libera Penso» protestas energie kontraŭ l'asasino de Ferrer. Ĝi esperas, ke monumento baldaŭ staros al la gloro de l'suferinto de la klerika malamego. Gi kolektis por tio la sumon da 16 fr.

— Tute imitinda aperas la iniciato de niaj sameclanoj en Beaune, precipe post la malnoblaj kalumnioj per kiuj la mortigintoj penis malpurigi la memoron de l'viktimo. Aliparte la sekretario de «Libera Penso» alpreniĝis kiel ano de l'komitato starigita de la franca Ligo por la defendo de la Rajtoj de l'Homo je la celo dediĉi monumenton al Ferrer sur placo en Parizo : li transdonos al tiu komitato la monon kolektotan de la societanoj.

**El Parizo.** — La kongreso de la nacia Asocio de l'francaj Liberpensuloj, en kiu partoprenis kelkaj anoj niaj, unuvoĉe esprimis la deziron, ke la Internacia Kongreso en Bruselo (1910) akceptu **Esperanton** kiel oficialan organon de la universala Liberpensularo, speciale en la kongresoj.

# Esperanto kaj Libera Penso.

Hispanlingva tradûko de la cirkulero de « Libera Penso » aperis en la Madrida ĵurnalo « Espana Nueva », kaj en la ĉiusemajna gazeto « Las Dominicales », organo de la Internacia Federacio de Liberpensuloj en Hispanujo, Portugalujo kaj Ameriko. Tiu ĉi kuraĝa malnova kunbatalanto, al kiu tiom multe ŝuldas la libera penso, aldonas kiel komentarion al la dirita cirkulero:

La antaŭaj linioj honoras eksterordinare la Societon « Libera Penso », ĉar ĝi vidigas varmegan kaj sindonan fervoron, tiel por disvastigi tutmondan lingvon, kiu estu komuna ligilo inter ĉiuj homoj de la terglobo, kiel por propagandi la helan kaj savigan idealon, kiun celas la Internacia Libera Penso.

Tiuj eraras, kiuj konsideras Esperanton kiel malsaĝaĵon. Ĝi respondas al nepra bezono de la kosmopolitismo kaj tutmonda komercado de nia epoko. Same kiel sin altrudis la metra sistemo por ke ni havu komunan mezurilon, tiel sin altrudas komuna lingvo. El tio devenas la klopodoj de homoj studemaj kaj bonaj, por elpensi tutmondan lingvon, inter kiuj venkis la aŭtoro de Esperanto.

La utilo de la elpensaĵo estas videbla; jam miloj da homoj apartenantaj al ĉiuj landoj kaj rasoj sin komprenas por utilaj interrilatoj dank'al Esperanto, kaj tio estus al ili tute neebla sen tiu perilo; ĉar la nura laboro, lerni vivantan lingvon kun ĝia grandega varieco de formoj vortaj kaj sintaksaj, postulas jarojn da laboro; tiom pli, lerni ilin ĉiujn por komuniki kun germanoj, angloj, rusoj ĥinoj, k.t.p. Kontraŭe, Esperanton oni lernas dum malmulte da tempo.

Fine la estraroj devigos ke la infanoj lernu Esperanton ĉe la lernejoj, kiel ili lernas la metran sistemon, donante al ili per tiu interkomunikilo, trezoron de moralaj kaj materiaj bienoj netakseble valoran, ĉar ili tiel povos vivi en sia patrujo, kunigitaj kun la tuta Homaro.

Pro tio sin pravigas la nobla fervoro, kiun montras la Esperantistoj por propagandi sian lingvon, altrudante al si la plej senprofitajn kaj malavarajn oferojn, kun la antaŭsento ke ili faras grandan bonon al la homoj. Ili estu certaj pri nia vigla simpatio kaj pri nia voĉdono favora al la propono, kiun ili prezentis al la Internacia Libera Penso.

Las Dominicales. Madrid 3 2.1911.

PAUL LINARES. (Cordoba).

# La eklezio en Ameriko.

La eklezio en la nova mondo laŭcele kaj laŭskope iomete malsimilas la eklezion de la malnova mondo. Notu la raporton de la delegitoj al la kunveno de la episkopaj eklezianoj. Rigardate de la vidpunkto de la malnovmondulo ili sin okupas je demandoj ne strikte ekleziaj ĉar oni forte « rekomendis la malpliigon de la horoj de l'laboro por ke la individuo povu ĝui tiom da ripoztempokiom estas postulata de vera socia vivo. Ili postulis unu tagon de ripozo ĉiusemajne por ĉiuj kiuj laboras kaj, krom tio, laŭtempan laborenspezon en ĉiu fako de industrio. La eklezio povas aliĝi nek kapitalistaron, nek laboristaron; ĉar gi devas esti kaj resti la eklezio por ĉiuj. Forte postulata estas ke la eklezio bonuzu sian influon favore de rajtoj de l'homo. Tute ne estas necese devigi homan labori dekdu horojn potage, dum sep tagoj posemajne; nek por tiomete da laborenspezo necesigante la kunlaboron de la edzino kaj infanoj. La unua zorgo de kristanismo devas esti por ĉiam « kio utilas kaj utilos al la homo » nek « kio donas kaj donos la plej grandan monprofiton. Vera eklezio signomarkas kulto, sed kulto estas nek hebrea, nek kristana, nek nekredana; sed vera kulto de la ĝishodiaŭa eklezio estas la kulto tuthoma. Perfekta eklezio sub ĝishodiaŭaj kondiĉoj devas kunlaboradi por ke la tuthomaro atingu la altegan celon kaj idealon de la plej progresinta homaro. »

B. F. S.

# Liberpensa Kroniko

LA SOCIETO FRANCISCO FERRER aperigis raporton aprobitan la 18-an de Decembro 1910, de la ĝenerala kunveno de siaj fondintoj. Ĝi estas kompleta resumo de la efika agado de la societo, kiu fondiĝis por morale venĝi la krimon kontraŭ la konscienclibereco sur la personon de Francisco Ferrer. La broŝuro enhavas bildon de la monumento Ferrer, kiun oni intencas inaŭguri en Bruselo, la 13 an de Oktobro 1911, la dua datreveno de la krimo.

La ĝenerala sekretario sendos ekzempleron de la raporto al ĉiuj personoj, kiuj deziras kunlabori al la efektivigo de la projekto, aŭ kiuj ne estus ricevintaj la publicaĵon, tial ke ili ne metis sian adreson en la liston de la monoferintoj. Ili nur sendu sian vizitkarton al la Sekretariejo: Avenue Milcamps, 75, Bruselo.

LA NACIA ASOCIO de l'Francaj Liberpensuloj prezentis en Parizo la 25-an de Decembro sian ĉiujaran feston, « La

Pursana nutraĵo kaj medicinaĵo, tutsana ripozado kaj internacia paco.

Plena konsidero de la rajtoj de la publiko ĉiutempe okaze de malkonsentiĝo aŭ internacia minaco.

Adekvata flegado de dependuloj kaj krimuloj.

B. F. Schubert.

## INAŬGURO DE LA MONUMENTO FERRER

BRUSELO, 5 NOVEMBRO 1911

La inaŭguro de la monumento Ferrer restos ceremonio neforgesebla pro sia impresiga karaktero. Pli ol 300 politikaj aŭ raciistaj grupoj estis reprezentataj. Dum la vetero ne ĉesis sin montri en sia plej funebra aspekto, la procesio de tiuj multnombraj societoj, kiujn superis amaso da flagoj, (inter kiuj ni citas la esperantan standardon de la Antverpena sekcio de « L. P. ») marŝas laŭ la centraj bulvardoj de la Belga ĉefurbo, al la Placo St-Katerino, kie la monumento staras.

Tie, ĉiuj flagportantoj sin metas kun siaj standardoj ĉirkaŭ la memorilo, kies tuko, post elokventa parolado de pastro Hocart, falas, dum majeste resonadas la « marŝo de l' nobluloj » el « Tannhauser ».

La monumento estas grandioza. Ĝi estas verko de du belgaj artistoj : Puttemans, kiu belege skulptis simbola bildo de la genio de l' homaro, esprimanta per potenca supren-streĉo la triumfon de la Lumo, kaj Puissant, kiu metis ĝin sur gracian piedestalon el granito kaj ŝtono de Euville.

Sur la ĉefa flanko de la monumento oni legas :

« Al Francisko Ferrer, mortpafita en Monjuich, la 13an de
» Oktobro 1909, martirulo de la konsciencliberec o ».

La 3 aliaj flankoj portas la jenajn menciojn :

« .... kaj mi min trovas antaŭ proceso farita, sen ke la
» esplorintaro, nur ĉasante la kulpigojn...., serĉis unu solan
» momenton la veron.

» Kapitano Galceran, pledante por
» Ferrer, la 9an de oktobro 1909 ».

« La racia instruado povas kaj devas ĉion diskuti, metante
» sur la rekta vojo la personan serĉadon. »

Francisko Ferrer. Letero de 24 januaro 1907. »

« Starigita per internacia monoferado.
» Inaŭgurita la 5an de novembro 1911. »

La monumento Ferrer estas ne nur honorigilo al la pens-libereco, malkuraĝe sufokita de ĝiaj eternaj malamikoj, sed ankaŭ riparanta verko, kontraŭ homo kiu kuraĝis brave morti por sia idealo de popola spiritliberigo.

## Estu kontenta pri via sorto !

Ne estas la unuan fojon ke ni aŭdas tiun ĉi rekomendon : « Abnegacio pri via sorto, kontenteco, jen estas la feliĉego de la vivo »...

La abnegacio estas rezulto de kelkaj filozofioj, sistemaj meditoj, kaj dependos de niaj tutmondmeditoj por diri kion ni pensas pri la kontenteco pri la sorto. Religiemuloj kiuj pensas vivi ankoraŭ novan vivon post la nuna, kiuj pensas ke ili estos punatoj aŭ rekompencataj dum la sekvanta vivo laŭ sia nuna konduto, personoj kiuj atendas pacience la tempon kiu povas veni ĉiun sekundon, la tempon kiu liberigos ilin de la nuna vivo kaj portos ilin en vivon dum kiu ĉiuj bezonoj kaj deziroj estas kontentigataj, tiuspecaj personoj povas kontentiĝi kaj akiri kontentecon pri sia sorto. Sed homo kiu scias ke la morto nur estas interŝanĝo de la materio, homo, kiu scias ke la vivo estas nur formoj kaj efektoj de materiŝanĝo, kiu senfine diferencas, tia homo ne pensas ke li konservos je la disiĝo, la konscion de ĉi tiu vivo, do ne kredas je puno aŭ rekompenco dum la sekvonta vivo. Se ni cirkaŭrigardas en la naturon, ni vidas ke ĉiu materiformo, ĉiu organhava aŭ neorganhava estaĵo formiĝas senĉese kaj penadas por alĝustiĝi al la speco de tero kaj klimato, de medio kaj bezonoj.

Tiu ĉi daŭra aliiĝo, tiu ĉi pliboniĝanta alĝustiĝo, tiu ĉi pliboniĝo, ĉu ni ne povas nomi ĝin la rezulto de la malkontenteco pro estantaj vivkondiĉoj ?

Se kontenteco ekzistus, tiam estus senmovado, kaj ĉi tiu ne estas ebla en la granda kosmo, kie senmovado mem estas movado.

En la naturo ekzistas malkontenteco, kiu estas la vivo mem; ĝi estas la daŭra penado por perfektiĝo, por pli bona alĝustiĝo, por plia plenumo de bezonoj kaj deziroj.

Kaj homo, ĉu ĝi diferencas ? Ĉu gi povas paroli pri kontenteco, kiam ĝi sentas ke mem la unua necesaĵo de sia stomako ne estas trankviligita ?

Ĉu li povas esti kontenta, la malsatulo, kiu estas elsuĉata ĝis la lasta guto de sia laborenergio ?

Ĉu ĝi povas kontentiĝi, la homo kiu ne povas plenumi la pli grandajn necesojn de la homa organismo ?

Ĉu ĝi povas kontentiĝi, la homo kiu scias kaj sentas ke ĝi devas, tiel kiel ĉiuj aliaj naturformoj, alĝustigi sin ?

Ĉu ĝi povas kontentiĝi, la kreito, kiu scias ke estas sufiĉe da rimedoj por kontentigi la tutan homaron, dum ĝi malsatas kaj laboregas por peco da pano.

Ĉu la homo povas esti pli suba ol la bruto ?

Ne, tio ĉi ne povas....

La sorto de la homo ne povas kontentigi ĝin, kaj estas malbona moralo, kiu lernigas al la homo ke ĝi ne devas penadi por pliboniĝo, por perfektiĝo, sed ke ĝi devas abnegacii kaj esti kontenta pri sia sorto.

Penadi por plibonigo de nia sorto estas devo de la tuta homaro, kaj la vivo en situacio, kiu estas malbona por nia organismo, estas kontraŭnatura, do malbona ago.

Ĝenerale, tiu, kiu kredas al sekvonta vivo, kredas ankaŭ ke la kreinto ekzistas.

Se la kreinto permesis ke la homaro de la kreo ĝis nun faris eltrovojn kaj elpensojn, tiam li montras al ni ke li estas

permesos al la du partoprenantoj libere interŝanĝi iliajn ideojn pri la vivo kaj plene sin studi reciproke; tiel ili baldaŭ vidos, ĉu ili estas aŭ ne faritaj, por post tempo akordiĝi en geedza kuniĝo. La demandoj pri heredeco, nasko, edukado povos esti traktataj senĝene en tuta trankvileco. Tio certe estos pli morala ol la nunaj interparoladoj de la „bone edukitaj" gefianĉoj, kiuj krom iaj konvenciaj nuancoj akceptataj de la amindumo, kuraĝas stari nur sur komunaj temoj.

Talenta junulo, kiu volos fari longajn studojn, tute ne estos malhelpita de tio por edziĝi. Ekzemple li dudekkvarjara povos edziĝi kun dekokjara junulino kaj ankoraŭ studi ĝis dudeksesjara. La malbono ne estos tre grava, ĉar la simpleco de la moroj estos sekvita de tiu de la mastraĵo, kaj oni facile povos, se necese, dank' al la kontraŭgravedaj rimedoj, atendi unu aŭ du jarojn antaŭ ol naski idojn.

Kia iĝos la geedzaro mem? Unue oni malgrandigos ĝis minimumo ĉiun neutilan lukson kaj ĉiun konvencian formaron. La edzo kaj la edzino ambaŭ laboros, ĉu kune ĉu ĉiu siaflanke laŭ cirkonstancoj. Parto de la laboro nature estos dediĉata al la idoj. Kiel nun, la edzo povos partopreni ilian personan edukadon, se li havas por tio pli da kapableco ol la edzino. Tiu okazo ne estas malofta.

La egalrajteco de la du seksoj kaj la matriarkato tute ne igos malpli intimaj la geedzajn rilatojn, sed kontraŭe profundigos iliajn radikojn, altigante ilian moralan valoron. Oni ne plu konos la oficialajn invitojn kun gratuloj, ĉiuspecaj malsimpligoj, digestaj vizitoj, k.t.p. Tio estas aferoj faritaj por la mallaboremaj riĉuloj, kiuj havas tempon por perdi kaj monon por revendi. Se venas amiko aŭ konato, se oni havas sufiĉon por lia manĝo kaj tempon por lin ricevi, oni invitas lin sen alia formo kaj hazarde de la poto ĉe la familia tablo.

La laborado kaj la penado direktataj al la idealo de la socia vivo estas kaj restas tio, kio plej sane disigas de la seksa inklino. Kontraŭe la senokupeco, la luksemo kaj la malvirteco de la moroj en la grandaj urboj degenerigas ĝin, ĝin dresante laŭ sia maniero kaj igante ĝin ĝia propa celo, kiel oni povas vidi ĉe la ĉiuseksaj herooj de tiom da salonoj, de niaj proletariaj drinkejoj kaj de niaj modernaj romanoj. Plie laborado refreŝigas amon kaj lasas malmulton da tempo por la geedzaj interinsultoj.

Oni provu praktike efektivigi nian utopion anstataŭ ol moki ĝin, altege starante sur siaj malnovaj antaŭjuĝoj. Per iom da karaktera sendependemo, jam nun oni povas ĝin grandparte praktiki por si mem, kontraŭstarante la ricevitajn antaŭjuĝojn.

Dr. A. FOREL, Yvorne près Aigle (Svislando).

El la franca lingvo kun permeso de l' verkinto tradukis CAMILLE CHANDELLIEZ,
Atestulo pri Kapableco de la S. f. p. E.. 69 Strato des Noes,. Troyes (Francujo).

## Pri la Eŭkaristia kongreso.

La kongreso en Wien komencis la 10an de Septembro. La tuta urbego estis tre solene ornamita per flagoj, precipe la preĝejoj. Alvenis tre multaj pilgrimantoj el ĉiuj landoj de la tuta monarĥejo, eĉ el Ameriko. Ĉe la ĉefa procesio kun Eŭkaristio dimanĉon antaŭtagmeze pluvegis, sed la fanatikuloj estis tiom multaj, ke la alfluo devis esti barita per policanoj kaj soldatoj. La entuziasmigitoj ne atentis la stratan koton, sed genufleksadis por ricevi benon de Monsinjoro Van Rossum.

La Germanaj liberpensuloj en Wien eldonis informilon precipe direktitan kontraŭ la kongreso, kaj oni disdonadis ĝin sur la stratoj. Pro tio estis arestitaj 200 homoj! Sed la pastroj povas disdonadi ĉiudimanĉe siajn propagandilojn kaj senpune.

Oni aranĝis la kongreson por entuziasmigi eĉ pli multe la fanatikulojn, por savi la regadon de kristsocialuloj en la viena urbestraro. La estraro donacis 50000 kronojn por la kongreso, kaj la malsanulejoj estas en tia fia stato, ke la malsanuloj ne estas akceptataj en ili, kaj la malriĉuloj mortas ie en angulo sen ia helpo.

A. ZEDNIK.

## Por la revizio de la proceso de Ferrer.

Okazis en Madrido la 2an de Novembro, sub prezido de D-ro Simarro, granda kunveno por peti la revizion de la proceso de nia neniam forgesota martiro Ferrer. Ĉiuj liberpensaj famuloj kaj societoj de la tuta mondo sendis aliĝon al la ripara entrepreno. Jen la letero de „Libera Penso", represita en la ĵurnalo „El Pais" (12 Nov.):

„Al S-ro D-ro Luis Simarro, profesoro de l' Universitato, Madrid. Por la kunveno 2 Nov. La Esperantista Internacia Societo „Libera Penso", kies membro estis Ferrer, protestas kontraŭ la abomena verdikto, kiu mortigis la martiron, kaj unuigas sian voĉon al la krio de ĉiuj liberpensuloj, de ĉiuj honestaj konsciencoj en la tuta mondo, por postuli la revizion de l' proceso.

La sek. R. D."

## JAROSLAV VRCHLICKY.

La reĝo de l' bohemaj poetoj, Jaroslav Vrchlicky, mortis la 9an de Sept. en Domaĵlice (Bohemujo) post dujara malsaneca suferado.

En li perdis la Ĉeĥoj la plej modernan homon, kiu donis plenan direkton al la tuta ĉeĥa poezio. Li postlasis verkojn de senmezura prezo; li volis fari el ĉeĥoj nacion kulturan, eŭropan, el nia literaturo eŭropan kulturon. Li tradukis tre multajn ĉefverkojn el romaj lingvoj, de Hugo, Balzac, Baudelaire, France, Petrarca, Dante, Carducci, Poe, Shelley, Witman, Ibsen, Goethe, Schiller, Mickiewicz. Li malfermadis riglilojn al ĉiuj tutmondaj poezioj, per sia scio de 15 lingvoj, kantante pri humanismo, libereco, amo, frateco, civilizacio.

La plej granda ĉeĥa poeto iris kune kun la nuna evolucio. Li skribis tre multe, estis tiel fruktodona kiel Zola, Balzac, Hugo, Shakespeare. Li devis elskribi ĉion, kion li sentis.

Foriris la plej fidela propagandisto de Libereco de Penso, kvankam izolulo, sed ĉiam helpanta kaj amanta.

Sed ne forgesu, ke ni vivas en la ŝtato, kie oni estas punata ne demetante ĉapelon antaŭ Eŭkaristio, kie la pastroj perfortas poeton eĉ en agonio. Al la majstro kiu skribis. „La pastro anstataŭis al homoj la dion, la homaron krucumis" oni entrudis, kiam li estis jam mortanto, la lastajn sakramentojn. La poeto estas mortinta, li ne povas sin defendi, sed lia verkaro lin brile defendos.